

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj
ILEI

9-a jarkolekto

N-ro 2, 1979

Edistudio, Pizo, Italujo

ENHAVO

<i>S. Wilczyńska kaj M. Falska – D-ro Korczak kaj la infanoj</i>	<i>29</i>
<i>Helmut Sonnabend – ILEI-simpozio en Parizo</i>	<i>32</i>
<i>Helmut Sonnabend – Korespondo pri ekspozicio</i>	<i>33</i>
<i>Helmut Sonnabend – FRG: reagoj al la ILEI-rezolucio</i>	<i>38</i>
<i>André Pierard – Esperanto en mia lernejo</i>	<i>43</i>
<i>*** – Informoj el Usono</i>	<i>44</i>
<i>István Szerdahelyi – In-problemoj</i>	<i>45</i>
<i>Frédéric Le Magadure – Internacia Printempa Semajno 79</i>	<i>51</i>

D-ro Korczak kaj la infanoj.

Stefania Wilczyńska kaj Maryna Falska

Reznis do doktoro Korczak pri la profitdona kuracista profesio. Kiel publicisto kaj verkisto li estas jam konata. Tamen la sukcesoj de la literatura talento ne estas lia ĉefa vivtasko. Li estas 33-jara. Okupas la direktoran postenon en la Domo de Orfoj kaj loĝas en ĉambreto de subtegmentejo, super la infanaj dormejoj. Ĝi estas soleejo kun granda fenestro, al kiu kunflugas paseroj por manĝi disŝutitajn panerojn. Post la okupoj kun la infanoj kaj studentaro li trovas tie ĉi silenton kaj eblon koncentriĝi por la krea laboro – scienc-esplora, publicista, didaktika kaj literatura. Foj-foje aperas tie ankaŭ la infano sopiranta solecon. Por ke ĝi povu silente rigardi la mondon tra la fenestro – Korczak zorgeme preparos al ĝi seĝon. Kiel komprenis kaj penetris Janusz Korczak – humanisto en la bezonojn de la infano – atestas la ĉi-sube prezentita "Malfermita fenestro":

La infanoj povas libere eniri mian ĉambron. Anticipa kontrakto: estos permesite ludi aŭ nur duonvoĉe interparoli, aŭ – kompleta silento. Mi havas por akceptado de la gastoj malgrandan seĝon, fotelon kaj tabureton. Estas tie tri fenestroj kuntuŝigantaj reciproke; la meza malfermita; parapeto malalte – 30 centimentroj sur la planko. De pluraj jaroj ĉiutage mi lokigas la seĝeton, la foteleton kaj la tabureton malproksime de la malfermita fenestro, foje eĉ mi kaŝas ilin ie en angulo. Kaj ĉiutage vespere ili staras senŝanĝe ĉe la malfermita fenestro. Iam mi vidas, kiel ili tuj, per decida movo, transŝovas la mebletojn, foje ili levas ĉi tiujn malbrue kaj delikate, preskaŭ kaŝe. Plej ofte mi tute ne scias, kiel tio okazis. En diversaj lokoj mi metadis ilustritajn revuojn, kaj mi malfaciligis alireblecon al la fenestro per florpotoj. Kaj ĝojigis min, kiel sagace ili ĉirkaŭiras la tentojn kaj forigas la malhelpojn; la malfermita fenestro venkas – eĉ kiam ventas, eĉ kiam pluvas, kiam estas malvarme.

La tropismo, kiu igas algojn amasiĝi tie aŭ tie, kiu supren kaj suben, eĉ ĝis kristaliĝo, ĝis la ĥemia parenceco – ordonas komponiĝi tiel, sed ne aliiel; la leĝo, kiu igas la terpoman trunketon suprengrimpi en kelo laŭ muro ĝis kradita supre fenestreto – kaj la sama ordono spite al la homaj malpermesoj, kiu malliberulon puŝas al fenestro, por rigardi en la spacon.

La infano bezonas movon, aeron, lumon – jes, konsentite, sed ja ion ankoraŭ. La rigardon en la spacon, la senton pri libereco – malfermitan fenestron.

La rolon de sentema kaj zorgema patrino, organizantino de la interna mastrumado kaj ordo, plenumis en la Domo de Orfoj inteligenta gvidantino, Stefania Wilczyńska, pedagogino kaj naturistino laŭ eduko, saĝa kaj kuraĝa virino, plena sindona al la infanoj. Ŝi forlasis bonstatan familian hejmon, por labori kiel edukistino en la azilo de Franciszkańska Strato (ekde 1908) kaj kune kun la infanoj ŝi transiris al la Domo de Orfoj ĉe la strato Krochmalna. La pedagogiajn indikojn de Korczak ŝi realigis plenfidele.

Korczak plej volonte nomus ĉi domon – Infano-Domo, por depreni de la infanoj la stigmaton de orfeco, la stigmaton de iu neplenvaloro inter samaĝuloj, en lernejoj, inter fremduloj. Li volis, ke tiu ĉi domo anstataŭu al la infanoj la perditan familion. Sed bonajn ekzisto-kondiĉojn povis tiam certigi nur larĝanima malavareco de mondonantoj. La vorto “orfo” iel pli forte tuŝis la korojn de filantropoj. La ŝildo restis do, kontraŭ la konvinko de Janusz Korczak. Ĝia rekompenco estis – kiel komuna verko de Korczak kaj Stefania Wilczyńska – la hela, varma, familieca atmosfero, plena je la infanaj konfido kaj rideto.

En la 1919a jaro Korczak kaj Falska kun la helpo de sociklerigaj agantoj, tiaj kiaj Stefania Sempołowska, Estera Gorde-Stróżecka kaj aliaj en la loko Pruszków apud Varsovio fondis en luita konstruaĵo orfejon sub la nomo “Nia Hejmo” por 50 infanoj laboristaj, el varsoviaj antaŭurboj, orfoj post malliberigitaj kaj persekutataj sociaj agantoj.

Korczak kune kun Maria Falska gvidas la Nian Hejmon.

Surbaze de la spertoj el la laboro kun la infanoj en la Domo de Orfoj ili kune prilaboras la sistemon kaj metodojn edukajn. Baldaŭ la Nia Hejmo kaj la Domo de Orfoj fariĝas modelaj stabloj de la kompleta prizorgo, edukestabloj avangardaj por la tuta lando. Komence la financaj rimedoj por la Nia Hejmo estas modestaj. Ĝi estis nur subtenata de neriĉaj tiam laboristaj sindikatistoj. Estas do en ĝi malvaste, kaj malvarme, kaj malsate. Sed la infanoj havas la tegmenton super la kapo kaj la amatajn prizorgantojn, kiuj anstataŭas gepatrojn.

Kiel foje estis malsato, Falska skribis en la notaĵo en la Kalendaro-Kroniko de la 1921.06.17a, jene:

Hodiaŭ, escepte, la infanoj ricevis panon por la matenmanĝo. Kiam

sinjorino Ziuta donis lian porcion al Joĉjo K., li kapklinis antaŭ sia panpeco kaj – kiam li havis ĝin en la mano – li kisis ĝin solene. [...]

Serene la infanoj eltenadis la mizeron. Pano mankis, sed ne mankis rido kaj ludoj. Sprito, rido kaj ludo – en la infana medio ne superŝarĝita, ne malserenigita pro infana humiligo – ĉion penetros kaj ĉion tralumos – kaj spite al ĉio – ĉiuj baroj ĉirkaŭiros. [...] Nur dum longa tempo ne povis fiksiĝi komunaj ludoj de ĉiuj infanoj kune. Sed kiu vidis nian domon – ĉe la strato Cedrowa, posedaĵo de s-ro Pawłowski – la mizeron de la korto apud ĉi tiu domo, li facile komprenos kial. La lasta jaro interligis la pli junajn kaj pli aĝajn geinfanojn, la knabojn kaj knabinojn per la sola komuna ludo ebla ĉi tie – la danco. [...] La vasta blovo de la efektiva vivo – la unua forveturo de ĉiuj infanoj somere en la 1926a jaro al Klimontów en ĉirkaŭaĵo de Sandomierz.

La domoj por orfiĝintaj infanoj estis bazitaj finance sur libervolaj enpagoj bonfaraj... Kiom da fortostreĉo postulis la klopodadoj pri vivrimedoj por tiel grandaj infanaroj! Korczak kaj Falska starigas antaŭ si ankaŭ aliajn celojn: transloĝigo de la infanoj al konstruaĵo speciale konstruita laŭ la bezonoj. Korczak havas jam la spertojn al la Domo de Orfoj kaj pli grandajn spirojn. Devas esti eĉ pli bone.

Korczak havas grandan moralan aŭtoritaton kaj talenton inklinigi homojn por kunlaboro. Li arigas ĉirkaŭ si valorajn homojn, scipovas devontigi, instigi, stimuli, revigi tiagrade, ke li trovas helpojn kaj kunlaborantojn, kiuj laboras strikte laŭ liaj indikoj. La movado por la helpo al la infanoj ĉirkaŭprenas ĉiam pli vastajn rondojn en la Sendependa Pollando. Kiam la protekton super la Nia Hejmo transprenis grupo da sinjorinoj apartenantaj al la registaraj aferoj – ekokazis plibonigo de la materiaj kondiĉoj. Kaj do en la jaro 1928 la infanoj transiras al ampleksa, jam propra domo, konstruita en antaŭurbo de Varsovio, en sana ĉirkaŭaĵo, en Parko Bielany.

Tradukis: Jerzy Uspienski.

ILEI-simpozio en Parizo.

Helmut Sonnabend

Mi atentigas pri grava evento en Parizo. Tie okazos simpozio pri la lingva demando. Bonvolu konsideri vian kontribuon kaj rekte skribi al James Fairbank, 6 avenue Th. Rousseau, F-75006 Paris.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en la kadro de l' U. E. R. pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, universitato René Descartes, organizos simpozion pri "Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia -Eŭropa- lingvo".

La tasko de la simpozio estas nomi lingvon kiu povus esti komuna por ĉiuj sociaj, kulturaj, politikaj kaj ekonomiaj interrilatoj en la fondiĝanta Eŭropo. La temaro ampleksas la socian problemon kaŭzata de la lingvodiverseco en internaciaj rilatoj:

1. la historio de la problemo, kaj
2. la nuna situacio de la problemo.

La simpozio okupiĝos pri la solveblecoj kaj la solvproponoj laŭ sociaj, ekonomiaj, politikaj, demokratecaj, lingvistikaj, pedagogiaj kaj fakteĥnikaj kriterioj.

Ili estu aplikataj al:

1. la latina lingvo kiel klasika lingvo en revivigita aŭ simpligita formo,
2. la angla, franca, germana, hispana kaj rusa lingvoj aŭ en normaj aŭ en simpligitaj formoj,
3. projektitaj aŭ seninflua planlingvoj kiel Volapük, Idiom Neutral, Interlingua, Ido, Occidental kaj Novial,
4. Esperanto kiel sola lingvo transformiĝinta de projekto al vivanta.

La simpozio daŭros tri tagojn (de 1979.10.18 al .20) kaj okazos en la universitato René Descartes, 12 rue Cujas, F-75005 Parizo. La unua tago antaŭvidos prelegojn enkondukajn en la temaron, dum la dua servos al la pristudado de la demandoj en laborgrupoj. La trian tagon estos raportite pri la rezultoj fare de la laborgrupoj en la plenkunveno. Sekvos diskutado kaj eventuala rekomendo de unu lingvo kiel komuna Eŭropa lingvo.

Korespondo pri ekspozicio.

Helmut Sonnabend

La 8an de Novembro 1977 la Estraro de ILEI vizitis Uneskon kaj estis akceptita de s-ro Arsov, ĉefadjunkto pri Rilatoj kun Internaciaj Organizoj.

La estraro prezentis sian projekton organizi ekspozicion de infandeseĝnaĵoj kaj -pentraĵoj kiel ankaŭ fotoĵoj. S-ro Arsov mem proponis ekspoziciei en la enir-halo de Unesko kaj petis pluajn detalajn informojn.

Reveninte de la estrarkunsido, la prezidanto la 14an de decembro 1977 skribis longan leteron al s-ro Arsov kaj donis la deziritajn pluajn informojn: menciitaj estas la ŝtatoj kun kiuj ILEI havas sekciajn rilatojn kaj petata estis la ekspoziciaj temoj, la taksita nombro kaj lige kun ili la bezonataj tabuloj laŭ m². Proponita estis la tempo inter la 2a de aprilo ĝis la 15a de junio 1979.

La letero de la prezidanto estis respondita la 11an de julio 1978. Respondis la ĉefo mem (s-ro Eric Armerding):

Estimata sinjoro,

per letero de 14a de decembro 1977, vi afable informis pri kelkaj detaloj rilate al via propono pri Monda Ekspozicio de Infandeseĝnaĵoj en 1979 ĉe la Unesko-sidejo, projekto pri kiu vi antaŭe parolis kun s-ro Arsov la 8an de decembro.

Agnoskante ja la intereson, kiu povus prezenti via projekto, kaj dankante vin pro tiu iniciato, la Komitato pri Kulturaj Manifestacioj, dum ĝia kunveno la 6an de junio 1978 esprimis timojn pri la multeco de infan-deseĝnajaj ekspozicioj kiuj povus okazi en la Unesko-sidejo okaze de la Internacia Jaro de la Infano.

Fakte, du ekspozicioj pri "Desegnaĵoj kaj mozaikoj de infanoj el Popola Respubliko de Bulgarujo" kaj "Desegnaĵoj kaj pentraĵoj de afrikaj infanoj" jam estas aprobitaj por la periodo de la dudeka sesio de la Ĝenerala Konferenco. Aldone UNICEF kaj Unesko kune organizos, en 1979, tre gravan mondan konkurson en junio. Krome de tiuj ĉi projektoj estas aprobitaj fotografa ekspozicio "The children of this world" kaj alia pri infanaj libroj prezentotaj de Libra Foiro de Frankfurto.

Tial, la Komitato pri Kulturaj Manifestacioj opinias, ke via projekto nur estus akceptebla se ĝi prezentus efektivaĵajn garantiojn pri la original-

eco kaj la kvalito de la laboraĵoj ekspoziciitaj. Tiurilate mi estas komisi-
ita, peti de vi plej multajn komplementajn informojn antaŭ ol fari dec-
idon pri via porpono. [...]

Eric Armeding.

La prezidanto de ILEI jam respondis 9 tagojn poste, la 20an de julio:

[...]

De mia konstanta reprezentanto ĉe Unesko, s-ro J. Fairbank, mi ric-
evis kopion de letero, skribita je la 11a de julio, en kiu vi petis aldonajn
informojn.

Mi komprenas, ke en 1979 okazos en Parizo pluraj ekspozicioj, kiuj
ĉiuj similas en la temo kaj kontribuos al la "Jaro de la Infano". Kelkaj
jam estas aprobitaj de via koncerna komitato. Ĉiuokaze mi afable dankas
vin, ke la komitato en junio okupiĝis pri nia iniciato prezenti la infanajn
kontribuaĵojn sub la indikita temo: "Ne rasoj, sed ni infanoj vivas en la
mondo".

Sendube signifas tiuj ĉi laboraĵoj tre gravan atentigon pri la rasaj
problemoj, kiuj esence nur povos esti solvitaj per pacienca edukado. Tiu-
cele instruas niaj geinstruistoj ligitaj en ILEI.

Tiu principa bazo ampleksigas la taskojn por la infanoj, pri kiuj mi
informis en mia letero de la 14a de decembro 1977. Rilate al la demand-
ita originaleco de nia planita ekspozicio laŭ nia scio kaj kono ĝis nun nen-
iaj registaroj, organizaĵoj ligitaj aŭ ne al Unesko iam kaj ie produktis la
saman esencan, unikan ideon. Mi povas certigi al la Komitato pri Kulturaj
Manifestacioj, ke ni nur elektos kaj ekspozicios kvalitajn laboraĵojn, sed
mi devas atentigi vin, ke jen infanoj desegnas aŭ verkas kaj ni ne povas
mezuri ilin per niaj plenkreskulaj okuloj.

La temoj rilatas al la infana vivo kaj demonstros la egalecon de la inf-
anaj deziroj, ĝojoj, doloroj kaj sentoj – tute ne ligitaj al rasoj.

Por ne tro ŝarĝi vian halon ni reduktos la kvanton de la desegnaĵoj
kaj pentraĵoj al almenaŭ 700 ĝis 800 verketoj, t.s. ankaŭ redukton de la
ekspoziciaj tabuloj, do proksimume 50 m².

Mi proponas la temon de la 2a de aprilo ĝis la 30a de majo 1979.

[...]

Helmut Sonnabend

Pasis la tempo – informoj pri la sorto de nia ekspozicio ne alvenis. La
prezidanto de ILEI decidis parisloke vidi kio estas. La trian de novembro li
estis akceptita de s-ro Armeding. Li demandis, ĉu la respektiva komisiono jam
decidis pri la letero de ILEI de 78.07.20. De julio ĝis novembro okazis nenio.
Sed s-ro Armeding kaj s-ro Asov (la lasta alvenis iom pli poste) emfazis la nec-
esecon ekspozicii niajn desegnaĵojn kaj pentraĵojn. Fine de novembro kun-
venus denove la respondeca komisiono por decidi pri nia ekspozicio.

Pri nia klopodado eventuale ekspozicii en la Centro de G. Pompidou
estos raportite aliloke.

Unue fine de la jaro 1978 evidentiĝis la ebleco por ILEI ekspozicii en
Unesko kontraŭ pago de 2 366 FF – potage kompreneble. Por ILEI tiu ĉi
postulo estis dise de ĉiu diskutado, sed montriĝis por ILEI nova elirpunkto:
de s-ino Marina Michelotti (nia sekciestrino en Sanmarino) la prezidanto estis
informita, ke s-ro A. M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko, estis vizitanta
Sanmarinon je la 1978.12.14a, kaj estis interalie tre kore salutita de lernejoj
infanoj, kiuj invitis lin, inaŭguri la mondan ekspozicion. La ĝenerala direktoro
konsentis, kondiĉe ke li ricevos oficialan inviton.

Informite pri tiu ĉi evento en januaro 1979 la prezidanto tuj skribis al
s-ro M'Bow, detaligis la ĝisnunan staton, emfazis ke ILEI sindone kunlaboras
kun Unesko, invitis en la nomo de la infanoj kaj proponis lokan halon en
Unesko. La respondo alvenis la 13an de marto 1979:

[...]

En la nomo de la ĝenerala direktoro, mi havas la honoron atesti ric-
evadon de via letero de la 8an de februaro 1979 per kiu vi transdonis al li
la peton, esprimitan de s-ro Helmut Sonnabend, prezidanto de la Inter-
acia Ligo de Esperantistaj Instruistoj prezenti la ĉisupre cititan ekspoz-
icion en la Domo de Unesko.

Tiu ĉi projekto estis objekto de profundaj esploroj je diversaj sekcioj
rilatantaj pri tia afero. Agnoskante ja la intereson pri via propono kaj la
fruktodonan laboron plenumitan de via Ligo, la fakaj oficoj de Unesko
atingis la konkludon, ke la jam eksterkutime ŝarĝita tempodistribuo de la
ekspozicioj dediĉitaj al la temo de la infano dum la jaro 1979a ne ebligas
jesan respondon al via peto.

[...]

R. Marqués, Direktoro p. i.
Ofico por Konferencoj pri Lingvoj kaj Dokumentoj.

Tiu ĉi definitiva respondo decidigis la estraron elekti alternativon: la urbo de la ekspozicio estos nun Lokarno – la loko de nia 13a Konferenco.

Tamen ekzistis ankoraŭ ĉiam la promeso de s-ro A. M'Bow. Tial la prezidanto skribis denove al li:

20a de marto 1979

Sinjoro Ĝenerala Direktoro,

afablan dankon pro via respondo de la 13a de marto 1979. Mi tre bedaŭras, ke tre riĉa kaj profunda atesto de infana esprimkapablo ne trovis lokon en la centro de Unesko.

“Ne rasoj, sed ni infanoj vivas en la mondo”, tiu ĉi devizo substrekas la intencon de Unesko kaj de nia Ligo senkompromise defendi la Homajn Rajtojn. La Internacia Jaro de la Infano estas pretendo por nun kaj estonteco. Ni konstante celas pluajn konkretajn paŝojn al internacia interkompreniĝo inter la infanoj.

Tre estimata sinjoro M'Bow, la infanoj de Sanmarino kiujn vi vizitis, skribis al mi, min demandante, ĉu vi ne forgesis vian promeson, inaŭguri la ekspozicion? Volonte mi ripetas mian inviton de la 16a de januaro 1979.

La ekspozicio okazos nun en Lokarno kunlige kun nia 13a Konferenco. Ĝia inaŭguro estos la 20an de julio 1979 je la 11.45, en la Scuola Magistrale Cantonale.

Vi certe samopiniis kun mi, ke al infanoj donita promeso ne permesos neglekton. Same mi kore invitas vin, partopreni la malfermon de nia Konferenco je la deka horo en la Società Elettrica Sopracenerina. Ĝi estas dediĉita al la ĝenerala temo: infano kaj lingvo.

Mi anticipas vian ĉeeston: la infanoj tre ĝojos vidi la Ĝeneralan Direktoron de Unesko kaj por nia konferenco via vizito signifus honorigon kaj rekonon de nia laboro.

Bonvolu akcepti, sinjoro Ĝenerala Direktoro, mian respekton kaj altestimon por vi persone kaj via granda laboro je la bono de edukado kaj kulturo en la mondo.

[...]

Jam la 11an de majo 1979 la Ĝenerala Direktoro respondis pere de s-ro E. Armeding:

[...]

Mi estas komisiita atesti la ricevon de via letero adresita al la Ĝenerala Direktoro, per kiu vi afable ripetis vian inviton al li inaŭguri la 20an de julio 1979 en Lokarno la ekspozicion de infanaj desegnaĵoj kaj fotoj “Ne rasoj, sed ni infanoj loĝas en la mondo”.

Estas ja tre kortuŝita de via afabla invito, la Ĝenerala Direktoro ege bedaŭras ne povi akcepti ĝin, ĉar je la sama tempo li devos partopreni al la Supera Konferenco de la Ŝtatestroj kaj registarestroj de la Organizo de la Afrika Unueco.

[...]

[subskribo]

La prezidanto de ILEI decidis ne lasi la aferon tia, kaj skribis novan leteron:

29.5.1979

Sinjoro Ĝenerala Direktoro,

kun granda danko mi konfirmas vian rapidan respondon de la 11a de majo 1979. ILEI akceptas la superan rangordon, ke vi devas ĉeesti en la Konferenco de la ŝtatestroj kaj registarestroj de la organizo de la Afrika Unueco.

Ni sekvas kun granda intereso ĉiujn politikajn, sociajn kaj kulturajn disvolviĝojn en Afriko kaj emfaze submetas nian atenton al la edukado de la infanoj. Ĉiu solvita problemo estas certe pozitiva paŝo al progesa kaj paca evoluado.

Tamen, ankaŭ per la granda ekspozicio malfermiĝos io, kies efiko ne nur estos limigita al iu rapidfluga momento. Mi volas preterlasi mencii nian konstantan insiston, vekti la interesiĝon de la infanoj, ĉu gravas la raso aŭ la homo.

Ĉu por Unesko estus konsilinde – ĉar vi estas malhelpata persone malfermi la ekspozicion – sendi anstataŭanton? Sinjoro Ĝenerala Direktoro, mi certe ne eraros, ke vi ankaŭ trovos solvon por la infanoj, kiuj iaforme nun estas “kunlaborantoj” de Unesko en la kontraŭrasisma jardeko.

Mi petas pardonon pro mia obstineco, kiu eble tamen ne tedos vin. Estime kaj espere atendante vian respondon

[subskribo]

FRG: reagoj al la ILEI-rezolucio.

Helmut Sonnabend

La 12a Internacia Konferenco de ILEI allasis interalie rezolucion pri la lingva situacio en la mondo. Per ĝi la registaroj estas demanditaj pri sia sinteno rilate la solvon de la lingva problemo (vidu IPR 78:3, p. 71). La diversaj respondoj estas iel tipaj.

La lingvan situacion en EK tre kompetente priskribas la Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco. Ĉu nun la koncerto inter la lingvoj en EK atingos pli altan ŝtupon?

1. Federacia Prezidoficejo.

II/ 1-6612- 527/28

Bonn 1, 7.12.1978

Tre estimataj sinjoroj,

la s-ro Federacia Prezidento komisiis min, danki al vi por via skribaĵo de 2.12.1978, kiu ĉi tie estas registrita.

Kun afablaj salutoj.

2. Krist-Sociala Unio (C.S.U.).

Munĥeno, 7.12.1978

Tre estimata...,

Komisiite de s-ro Strauss mi dankas vin pro via letero kaj la aldonita rezolucio. Bonvolu havi komprenemon, ke s-ro Strauss kiel ministro-prezidento de la Libera Ŝtato Bavario ne havas kaŭzon, doni oficialan deklaron. Sendepende de tio CSU kaj s-ro Strauss subtenas la reciprokan kompreniĝon de la diversaj popolgrupoj kaj popoloj en Eŭropo.

Kun afablaj salutoj.

3. La ĉefo de la ŝtatkancelario de la lando Ŝlesvig-Holstejnio.

3.79 - Stk 250

Kiel, 8.12.78

Tre estimata sinjoro...,

S-ro ministroprezidanto d-ro Gerhard Stoltenberg dankas pro via afabla skribaĵo de 2.12.1978. La rezolucio koncernas ja la tutan nacion, sed ne tiel la unuopajn landojn. Certe interesos vin, kiel ĉe ni en Ŝlesvig-Holstejnio estas la lingva situacio. Ĉiu Ŝlesvig-holstejnano parolas germane, tre multaj parolas malaltgermane. Krome estas regionoj en kiuj la dana estas parolata, kaj tio ofte malaltdane.

En Frislando en kelkaj regionoj estas parolata la frisa, kaj tio en pluraj dialektoj. La landa registaro klopodas konservi la kulturan multecon. Kompreniĝaj problemoj ne ekzistas. Ĝi aprobas ĉiujn klopodojn servantajn al kompreniĝado inter la popoloj.

Kun afablaj salutoj.

4. Libera Hanso-Urbo Brema.

Senata Kancelario

Brema, 12.12.1978

Tre estimataj...,

Sinjoro urbestro Koschnick petis min, tre kore danki al vi pro la alsendo de via rezolucio de somero 1978. La demandoj en ĝi certe ne devus esti respondataj de Brema, sed nur de Bonn.

Kun afablaj salutoj.

5. La Ĉefo de la Ŝtatkancelario de la Lando Nordrejn-Vestfalio.

Düsseldorf, 14.12.1978

Tre estimata...,

S-ro ministroprezidanto Rau petis min, afable danki al vi pro via skribaĵo de 2.12.1978. Al la tri demandoj mi diras la jenon:

La multlingveco en Eŭropo estas esprimo de la kultura multeco, kiu ankaŭ havos sian valoron en politika unuiĝinta Eŭropo. Ĉiu provo de nivelado nek servus la eŭropan unuiĝon nek la interesojn de la civitanoj.

La lando Nordrejn-Vestfalio ne havas la eblecon, proponi unu lingvon – ĉu unu de la ekzistantaj naciaj lingvoj, ĉu unu artefaritan mondlingvon – kiel komunan komprenilon en la Eŭropa Komunumo. La Federacia Registaro reprezentas en la Eŭropa Komunumo la Federacian Respublikon Germanion.

Kun afablaj salutoj.

6. Rejnlando-Palatinato: Ministro pri kulturo.

942 A-51 302/30

Mainz, 18.12.1978

Tre estimataj gesinjoroj,

ni dankas pro via letero de 4.12.1978 kaj respondas viajn demandojn jene:

Ni opinias, ke la perado de vastaj fremdlingvaj konoj en lernejoj havas grandan signifon. Niaj spertoj montras, ke per tio la ebleco de lingva interkompreniĝado konsiderinde estas akcelata.

Mi ne intencas enkonduki Esperanton kiel komunan "neŭtralan" lingvon

en la lernejan instruadon; anstataŭ tio mi opinias, ke estas sencplene perikonojn pri najbaraj popoloj. Aparte signifanta estas la celo, ebligi enigardojn kaj vekigi komprenojn pri la kultura vivo de ili, kaj profundigi la estimon inter la popoloj de Eŭropo.

Kun afablaj salutoj.

7. Stata Ministerio Badenio-Vurtembergo.

4581/8

Stuttgart, 19.12.1978

Tre estimataj,

komisiite de la s-ro ministro-prezidento mi dankas vin pro via skribaĵo de 2.12.1978.

La s-ro ministro-prezidento informiĝis pri via rezolucio konstatanta la ekziston de apartaj lingvo-problemoj en la triangulo de Italio, Aŭstrio, Jugoslavio.

Certe vi komprenas, ke la s-ro ministro-prezidento deziras sindeteni de iu komento, kiam temas – kiel tie ĉi – antaŭrange pri aferoj de eksterlandaj ŝtatoj kaj tial ne estas tuŝataj la interesoj de la lando Badenio-Vurtembergo.

Sed mi povas certigi al vi, ke por la landa registaro de Badenio-Vurtembergo ĉiam estas aparta deziro, emfaze akceli la lingvoinstruadon – en lernejo, altlernejo kaj popolklerigaj aranĝoj. Se plej eble multaj regus unu aŭ eĉ pliajn fremdlingvojn tiam estus plenumitaj la antaŭkondiĉoj por la politika, ekonomia kaj kultura kompreniĝado inter la popoloj.

Kun afablaj salutoj.

8. Bavaria Ŝtatministerio pri Instruado kaj Kulturo.

II/6-8/194690

Munĥeno, 19.12.1978

Tre estimata...,

La s-ro ŝtatministro transdonis al mi vian skribaĵon por respondo. Pri la sinteno de la Libera Ŝtato Bavario rilate modernajn fremdlingvojn informos la salutvorto de la s-ino ŝtatsekretario. Ŝi parolis okaze de malfermo de la federacia kongreso de la fakorganizo Modernaj Fremdlingvoj la 20.03.1978an. Volonte mi transdonas al vi kopion de la teksto.

Koncerne Esperanton la ŝtatministerio atentas la decidon de la Konstanta Konferenco de la Kulturministroj de la landoj en la Federacia Respubliko Germanujo de la 4-5an de novembro 1954 en la reskribo de 28-29an de septembro 1961; ĝi tekstas:

“La enkonduko de Esperanto kiel deviga fako estas rifuzita. Koncerne la

instruadon de Esperanto en libervolaj laborrondoj ne ekzistas kontraŭkonsideroj.”

Kun afablaj salutoj.

9. La Hesio Ministro pri Kulturo.

IV C4 - 957/231 - 113

Tre estimataj...,

Ankaŭ en Hesio la lingva problemo estas vidata ekz. estiĝanta pro la alta nombro de eksterlandaj laboristoj. Per proponoj celantaj la lernadon de la germana lingvo kaj la flegadon de la gepatra lingvo la landa registaro klopodas helpi la koncernatojn.

Al la tri demandoj de la rezolucio mi ne povas respondi. Ili estas de principa signifo por la tuta Federacia Registaro.

Kun afablaj salutoj.

10. La MalsuprSaksia Ministro pri Kulturo.

304 - 32 102 - 1/78

Hanovro, 19.1.79

Tre estimata...,

La senditan rezolucion de la konferenco en Gorico (Italio) mi legis kun intereso.

La konferenco okupis sin je lingvaj problemoj koncernantaj aparte la landojn Italio, Aŭstrio kaj Jugoslavio.

Kun afablaj salutoj.

11. La Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco.

Nr. 11/6 - 8/194690

5.1.1979

Tre estimata...,

Mi dankas pro via letero de 2.12.78 ricevita de la ĉefo de la kabineto.

Rilate la tri punktojn de la aldonita rezolucio mi diras la jenon:

1. La problemo de lingva kompreniĝo, kiu i.a. ankaŭ estiĝas en internaciaj rondoj, ĉi tie estas konata. Ĝuste pro tio la Eŭropa Parlamento eldonis antaŭ certa tempo rezolucion pri la klerig-politika demando en la Eŭropa Komunumo. Interalie ĝi emfaze postulis pliajn esplorojn kaj eksperimentajn projektojn rilate la fremdlingvan instruadon, “ĉar la forigo de antaŭjuĝoj kaj fortigado de reciproka konfido kaj komprenemo inter la popoloj de Eŭropo ankaŭ anticipas la kreadon de unu komuna instrum-

ento por komunikado.”

La Eŭropa Parlamento opinias, ke ĉiuj infanoj en EK ricevu la eblecon, akiri uzeblan konon de almenaŭ unu lingvon de la Komunumo. (oficiala informilo de EK – 11.12.1978, n-ro C.296/49).

2. Ne estas intencate interne de EK proponi iun nacian lingvon kiel komunan lingvon. Tia propono havus pro diversaj kaŭzoj nenian sukceson. Tiurilate EP esprimas sian opinion en la supre menciita rezolucio kaj rifuzis decidon favore por unu vivanta lingvo kiel unua deviga fremdlingvo, ĉar tio estus “senutila”.
3. Ĝuste por malavantaĝigi nenium lingvon, EK deklaris ĉiujn lingvojn de la membroŝtatoj samrajtaj ofic-lingvoj, La personara, financa kaj materiala bezono estas laŭnature signifa kaj ne evitas kelkokaze tradukerarojn. Sed tion oni devas akcepti, se la principo de la egalrajteco de la membroŝtatoj – ankaŭ rilate lingvojn – ne estus difektita.

La enkonduko de neŭtrala lingvo en internaciajn rondojn estas jam pli ofte proponita. La certe plej juna puŝo en la formo de rezolucia propono venis de EK-deputitoj por diskutigi la parlamenton pri la ebla enkonduko de Esperanto kiel laborlingvo por la EK. Sed ankaŭ pri tio ĝi decidiĝis negative, same kiel oni decidis kontraŭ unu lingvon kiel devigan unuan fremdlingvon. Kiel unuflanke dezirinda estus solvo de la nuntempa lingvo-problemo per kreado de komuna komunikilo, tiel maleble ŝajnas esti ties realigo pro la diversaj kaŭzoj.

Parlamentaj demandoj, postuloj de interesiĝantaj grupoj, rezolucioj de ligoj, kolektado de subskriboj ktp. alportis ĝis nun – kiel montris la pasinteco kaj estanteco – nenian decidon en la senco de pozitiva ŝanĝiĝo de la lingva politiko en internaciaj rondoj.

Kun afablaj salutoj.

Esperanto en mia lernejo.

André Pierard

Mi lernis la lingvon internacian perkorespondè dum unu jaro, kaj mi rapide ekpensis, ke la instruado de Esperanto kunportos pedagogiajn eblecojn.

Je majo 1977, post la internacia lerneja eksperimento entreprenita de s-ro *Sondervorst* ĉe lia komunuma elementa lernejo en la vilaĝo *Saint-Gérard* (Belujo) kaj, post kontaktoj kun la inspektoro kaj la direktoreco, en mia lernejo mi decidis instrui la lingvon internacian dum unu horo ĉiusemajne krom la normalaj studhoroj. Mi do komencis la instruadon je la 1a de oktobro 1977, kun 10-12 jaraj geknaboj.

Sed rapide, mi rimarkis, ke la Esperanto-kurso estas:

- *vortproviza leciono*: dank’ al ĝia “afiksa ludo”: post ok monatoj de lernado, vortoj estas komprenataj instinkte, sed ili situas malfacile en la infana vortprovizo. La geinfanoj do devos uzadi la nacilingvan vortaron por precizigi la penson nacilingve.
- *analiza leciono*: la adjektiva uzo, la akuzativo devigas, ke la lernantoj efektivas ĉiaman strukturan analizon, distingas agad- kaj statverbojn, observas la relativan pronoman meĥanisman, la komplementajn poziciojn.
- *sintaksa leciono*: oni klopodas esprimi nacilingve per idiomaĵoj la pozicion de gramatika grupo pri kiu oni insistas. Kiel esprimi diference: ‘la hundo rigardas la katon’, ‘la katon la hundo rigardas’, ‘la katon rigardas la hundo’, ‘rigardas la katon la hundo’, ‘rigardas la hundo la katon’.
- *konjugacia leciono*: la lernanto ĉiam devas uzi la efektivan konjugacian tempon, kiu ne ĉiam estas la sama kiel tiu en la nacia lingvo.
- *bonega antaŭscio por lernado de fremdaj lingvoj*: studadoj efektivigitaj ĉe malsamaj landoj al ni montras, ke geinfanoj lernintaj Esperanton dum unu jaro kaj fremdan lingvon dum alia jaro, efektivas pli bonajn rezultojn en tiu fremda lingvo ol tiuj, kiuj lernis tiun lingvon fremdan dum du jaroj.
- *plibonigo de legado kaj ortografio*: kompreneble, la esenca valoro de la literoj diferencas en Esperanto. Do la lernantoj devas esti atentaj pri la literoj, ankaŭ kiam ili legas aŭ skribas nacilingve. Oni povas kompari tion

kun la matematika baza ŝanĝo.

- *gajmienigo de la personeco*: la infanoj kutimiĝas al fremdlingva parolo. Plue dank' al ĝia facileco Esperanto ebligas, ke malpli naturdotitaj lernantoj povas esprimiĝi kaj manifestiĝi.
- *kleriga kaj socia leciono*: la infanoj lernas multajn informojn per korespondado pri geografio, historio, kleriga kaj socia vivo.

Kiam mi vidis, ke tiuj temoj ĉi-supre partoprenas al normaj instruitaj temoj de la unuagrada lernejo, mi instruis la lingvon internacian dum miaj normaj studhoroj. Kaj vi, kiam vi tion faros?

Informoj el Usono.

* * *

En Usono hodiaŭ nur 15% de la lernantoj ĉe mezlernejoj (14-18-jaraĝaj) studas fremdajn lingvojn, kaj nur 10% ĉe universitatoj. El 22 737 mezlernejoj, 4 344 ne havas fremd-lingvajn kursojn, kaj malmultaj havas pli ol du-jaran programon por ĉiu lingvo. Rezulte, lernintoj kiuj poste iĝas membroj de estraro civitana, kiu regas ĉiun lokan lernejon havas negativan vidpunkton al la studado de fremdaj lingvoj kaj malfavoras tion por siaj lernejoj.

Nur 53% de Usonaj universitatoj postulas fremdan lingvon kiel parto de "B.A."-diplomo, kaj nur 19% postulas fremdan lingvon por eniri.

Por studi la supre menciitajn problemojn, la Usona prezidento Carter starigis *Komisionon pri Fremdaj Lingvoj kaj Internaciaj Studadoj*, kiu provizore jam rekomendis ke registaraj subvencioj por la plua edukado de instruistoj koncentriĝu sur tiuj en la publikaj lernejoj (anstataŭ ĉe universitatoj kiel antaŭe), kaj ke komercistoj estu instigataj dungi junulojn kun lingva lerteco.

Inter la aliaj temoj kiujn la Komisiono raportu al la Prezidento estas rekomendo pri kiel publikigi la gravecon de la studoj de fremdaj lingvoj kaj internaciaj studoj, por plibonigi komunikadon kaj interkompreniĝon kun aliaj nacioj.

La Komisiono laboros ĝis printempo '79.

In-problemoj.

István Szerdahelyi

"Virinoj"?

Post dekse jaroj de esperantisteco mi ekhavas problemojn kun "virinoj" kaj "ulinoj". Kulpas pri tio: mia fido pri la relative alta logikeco de nia lingvo, la jaro de la "virino", Plena Ilustrita Vortaro, kaj jusa diskuto kun amikoj ĉi-teme. Konata estas la fakto, ke ne nur esperantistoj kutimas poluri kaj reflaksi sian lingvon, sed ĵusatempe ankaŭ la "virina" movado. Tiu lasta argumentas, ke la vira supereco dokumentiĝas ankaŭ en la historidevena lingvouzo, kaj do oni devus batali kontraŭ tio ankaŭ lingve. Tio kondukas al (nur parte ŝerca) uzo de ekzemple 'frau' anstataŭ 'man' (= "oni", en la germana, sed origine "viro"), en koncernaj inmovadaj ĵurnaloj. Kvankam unuavide oni emetus rideti pri tio, eĉ la plej obstina kontraŭ-inmovadulo devas koncedi, ke estas vero en ĉi-ĉio.

La demando, kiel ĉi-temo aperas rilate al la Internacia Lingvo, ŝajne ankoraŭ ne okupigis esperantistinojn, eĉ ne la rilatan kunvenon en la UK de Rejkjaviko. Pri tio mi konvinkiĝis en amika konversacio antaŭnelonge ĉi tie. Montriĝis en la diskuto, ke Esperanto ja estas kaj estis uzata en maskla senco, sed ke ĝi tamen havas la kapablon esti uzata pli egalece rilate la seksojn: temas pri la ekzisto kaj la uzo de la sufiksoj *ul* kaj *in*. Anoj de la inmovado tuj kvalifikus la vortformadon "virino" kiel masklisman, argumentante, ke ĉi-derivo estas analoga al la formado de la ino el la ripo de la unua viro. Kaj tio pensigis min, igis min preni mian PIVon kaj serĉi la difinon de "in". Kaj la stranga okazis: laŭ la difino donita tie la vorto "virino" estas logika absurdaĵo! "In" nek laŭ la unua (viro ne estas specio!) nek laŭ la dua (viro ne estas parenomo!) nek laŭ la tria semantika grupo povas sencoplene kombiniĝi kun "vir-".

Pri la tria semantika grupo necesas speciala komento: "al nomoj esprimantaj kvaliton, funkcion k.s.", inter kiuj figuras la ekzemplo "virino". Sed ĉu vere la funkcio de viro (laŭ PIV: "...organizita por demeti en inon la semon de ido") kombineblas kun "ino" por rezultigi sencaĵon? En tiu vidpunkto "virino" povus esti nur alia esprimo por "hermafrodito", ĉar ambaŭ seksaj reproduktokapabloj estas nomitaj. Se temas pri la kvalito de viro (do kontrasta al infano aŭ virino laŭ PIV) en semantika interpreto transiranta la nuran biol-

ogian reproduktan sferon, tiam “virino” estus ino, havaanta “viran” kvaliton. Ĉilasta povas varii laŭ la detaloj de kulturo al kulturo kaj de civilizo al civilizo, tamen laŭ nura logikeco tia “virino” ne estas la kutima, meznombra ino sed iu, kiu pli malpli forte tendencas al vira aspektaro. Eble komparu la germanan ‘Mannweib’ kiu esprimas similan inon. Ĉiuj inoj interne kaj ekstere de la Movado certe forte protestus, esti nomataj per tia nocio, kiu estas la rezulto de konsekvenca apliko de nia lingvo.

Ŝajnas do, ke “virino” nek kongruas kun egalecaj konceptoj (tiaj kiaj estas ankaŭ la Homaj Rajtoj) rilate la sekson, nek kun nia lingvo mem, aplikata en konsekvenceco.

Eble historiaj cirkonstancoj igis la unuajn (kaj postajn) uzantojn enkonduki la misformadon “virino”. Pledi, ke oni ne povus ŝanĝi tion pro tradicio, signifus ĝuste perdi avantaĝon de nia lingvo antaŭ la t.n. naturaj lingvoj (nome la reĝustigeblon de miskreskaĵoj).

En tiu respekto PIV en alineo III de “in” mencias ke la memstara uzo de “ino” okazas “plejofte kun malŝata nuanco”. Ŝajnas ke tio ankaŭ estas historia akompanaĵo, kiu laŭ opinio de nia diskutrondo ne devas akceptiĝi senkontrolate. Almenaŭ en la tempo de la lastaj 15 jaroj mi havas la impreson, ke “plejofte” ne plu ĝustas, almenaŭ en la buŝa lingvouzo, nek en tiu de la junularo (TEJO). Eble tiu lasta punkto estas nereкта pruvo, ke jen montriĝas historia ŝanĝo rilate la starpunkton pri la seksoj. Estus interesa tasko (*eble por doktoriga tezo!*) esplori funde, kiel ankaŭ en la literatura lingvouzo evoluis la semantiko de “ino”. Pravigeblo por la malŝata nuanco apenaŭ ekzistas, ĉar finfine ni ja havas “ac” aŭ “fi” por tiudirekte modifi “ino”n.

Mia demando do estas: ĉu ni ne pli konscie uzu “ino”n, kaj laŭeble evitu la tradician neegalisman kaj nelogikan “virino”n?

Ni kore petas pri kompetentaj komentoj kaj kontribuoj.

☆☆☆

Simila problemo leviĝas kun “ulino”. Konsekvence interpretita, la ekzemplo “belul-in-o” en PIV en la grupo 3/I de “in” esprimas inon, kiu havas la kvaliton, funkcion de belulo, do de bela viro. Sed tion la uzantoj de la vorto certe ne volas esprimi, ĉu ne? Kial ne uzi “belino”n, kiu laŭ PIV renkontiĝas nur en poezio kaj tolereblas nur, se “la radiko mem klare komprenigas ideon de persono”? La citita aserto de PIV malhavas logikecon, ĝuste tial, ĉar la radiko de la ekzemplo “belino” kiel izolitaĵo tute ne klare esprimas la ideon de persono (ankaŭ nepersonaĵo povas esti bela). La personigo okazas ĝuste

per la sufiksigo kun “ino”.

Uzi “ul” signifas nenian aldonon, nek logikan, nek semantikan. Ĝi estas kaj superflua, kaj en supra senco eĉ semantike misgvida. Ne uzi “ulino”n kaj anstataŭi ĝin per “ino” signifas praktikan koncizecon kaj logikecon samtempe. Denove ankaŭ la diskriminacia derivismo, simile al “virino”, evitiĝus.

Finfine, oni ja ankaŭ ne uzas “amatulinon”, sed amatinon. (Kvankam, laŭ PIV tio povus esplikigi per la – tamen ne senriproĉa – lingva konvencio, ke devie de la uzo de la adjektivo la participo en substantiva formo nociigas personon.)

Tial do mi sentas, ke kun “virinoj” kaj “ulinoj” oni ekhavas problemojn strikte observante la internan logikon de nia lingvo kaj aliflanke la lingvajn postulojn de egaleca traktado de la seksoj.

Hans Michael Maitzen.

Provo ion klarigi.

La supran leteron sendis al mi kolego Maizen petante mian opinion. Mi jam delonge sendis al li mian respondon kaj, espereble, li permesas publikigi kaj liajn pensojn, kaj la miajn por pensigi pri tiu temo ankaŭ aliajn.

Temas pri la kombinado de la sekvaj morfemoj: vir-, -in-, -ul-, kaj la participaj sufiksoj.

“Vir-” havas la sekvan semantikan formulon: $\frac{\text{homo}}{\text{masklo} + \text{plenaĝa}}$

“Knab-” havas la formulon: $\frac{\text{homo}}{\text{masklo} + \text{infanaĝa}}$

“Infan-” havas la formulon: $\frac{\text{homo}}{\text{neplenaĝa}}$

“Beb-” havas la formulon: $\frac{\text{homo}}{\text{et-aĝa}}$

Regulo: *el tiuj vortoj, kiuj enhavas en sia semantika formulo la komponenton “masklo”, per la sufikso -in- deriviĝas ilia femala paro.*

Tiamaniere ekestas triopa mikromodelo:

homo	↕	viro	infano	↕	knabo	bebo	↕	knabeto
		virino			knabino			knabineto

Ĉi tiu triopa mikromodelo ne ĉiam estas konstruebla:

PATRo $\frac{\text{homo}}{\text{masklo} + \text{generinta idon}}$ ⇒ PATRINo

Same: BUBO ⇒ BUBINO, MULATO ⇒ MULATINO.

Apartan modelon konsistigas la besto-nomoj.

ĈEVALo $\frac{\text{besto}}{\text{neparhufulo} + \text{ekvo}}$

en la difino mankas la komponento “masklo”, kio signifas ke la ideo estas ĝenerala, sen seksa markigo. En tia okazo la **regulo** estas: *ĉe bestonomoj kaj la maskla, kaj la femala nomo deriviĝas el la ĝenerala*:

ĉevalo $\begin{cases} \nearrow \text{virĉevalo} \\ \searrow \text{ĉevalino} \end{cases}$

(Ido konstruis la mikrosistemon per la opozicio -ul-/-in-:

kavalo $\begin{cases} \nearrow \text{kavalulo} \\ \searrow \text{kavalino} \end{cases}$).

Rimarko: ŝajnas esti lingva universalajo la regulo, ke la femalan nomon oni derivigas el la maskla (almenaŭ mi persone ne konas lingvon, kie la derivado okazas inverse).

La tria tipo estas la senparaj vortoj:

nur femalaj (sen lingva signo): amazono, madono, matrono, damo, subreto;
nur maskla: generinto.

Fine: kiam la vortparo esprimiĝas per du diversaj vortoj:

masklo – femalo (kaj ne *masklino).

La participaj sufiksoj kun finaĵo -o, same la sufiksoj -ul-, -an- kaj -ist- havas en siaj semantikaj formuloj du konstantajn, komunajn komponentojn: homo + masklo. Iliaj distingaj komponentoj estas: “ago, karakterizo, aparteno kaj aktivo/profesio”. Regulo:

eno kaj aktivo/profesio”. **Regulo:** *ĉiuj vortoj derivataj per la supraj sufiksoj havas -in- paron:* lernanto–lernantino, riĉulo–riĉulino, urbano–urbanino, instruisto–instruistino. Ĉiuj ĉi derivaĵoj apartenas al la du-elementa (para) sistemo.

Rimarko: estas observebla la tendenco (en certa situacio) uzi la masklan elementon kiel komunan, ĝeneralan:

esperantisto $\begin{cases} \nearrow \\ \searrow \end{cases}$ $\begin{cases} \text{esperantisto} \\ \text{esperantistino} \end{cases}$

kapitalisto $\begin{cases} \nearrow \\ \searrow \end{cases}$ $\begin{cases} \text{kapitalisto} \\ \text{kapitalistino} \end{cases}$

marksisto $\begin{cases} \nearrow \\ \searrow \end{cases}$ $\begin{cases} \text{marksisto} \\ \text{marksistino} \end{cases}$

La kaŭzo estas parte la ekonomio, aliparte la influo de certaj etnaj lingvoj. (En la Rusa oni tute ne uzas la femalan formon por la pli aŭtoritataj titoloj kiel: prezidento, generalo, profesoro, kuracisto k.s. Ekz: *Vera Ivanova vraĉ* “Vera Ivanova estas kuracisto” kaj ne “kuracistino”. Hodiaŭ eĉ ŝajnus ofendo diri: *vraĉiĥa* “kuracistino”, vorto tre similanta al *zjaĉiĥa* “leporino”. Sed la neologisman kaj elegantan sufikson -essa oni volonte uzas: *advokat* – *advokatessa* (“advokato” – “advokatino”).

Tra tiu optiko evidentiĝas ke:

“amato” – “amantino” sufiĉas (ne *amatulo) ĉar -at- enhavas la komponentojn: homo + masklo. Same “amanto” – “amantino”. (Sed, se -ant- enhavas la komponenton: homo + masklo, kion signifas “naskanto”? Ĉu masklo kiu naskas? Verŝajne ankaŭ ĉi-okaze ni renkontas senparan derivaĵon: eblas nur “naskantino”, aŭ “naskanta ino”, aŭ “virino naskanta”...

Same evidentiĝas, ke “belino” estas manka derivaĵo, ĉar la morfemo “bel-” enhavas nek la komponenton “homo”, nek la komponenton “masklo”. La funkcio de “-in-” estas ĝuste: ŝanĝi la komponenton “masklo” al femalo. Sekve devas esti “belulo” – “belulino”.

Ĉe “-ul-” (se ni konsideras la difinon de PIV) ekzistas ankaŭ aliaj streĉoj. “-Ul-”, kiel jam dirite, enhavas la komponentojn: homo kaj masklo. Tamen ekzistas ekceptoj:

ĝi povas havi la komponenton “besto” anstataŭ “homo”:

RAMPULO $\frac{\text{besto}}{\text{maskla} + \text{klaso de vertebruloj}}$

Rimarko: PIV konsekvence uzas ĉiujn ĉi-tipajn vortojn plurale: hufuloj, amebuloj, mamuloj, araneuloj... signante tiel, ke temas pri grupo, klaso. Tial (eble) el inter la komponantoj povas manki la masklecon: oni diru “la hundino apartenas al mamuloj” kaj ne “la hundino estas mamulino”.

(Bedaŭrinde) “-ul-” povas nociigi ankaŭ nevivajn estaĵojn: laŭ PIV, trimastulo, triferdekulo, nubskrapulo – ĉi lasta (p. 1003): ĉielskrapanto. Nek “-ulo” nek “-anto” estas regula: ambaŭ signifas nepre vivan estaĵon, preferinde homon – sed neniokaze konstruaĵon! Tiaj esceptoj en la Internacia Lingvo estas tute superfluaĵoj.

Ke tiuj sufiksoj estas tre proksimaj unuj al la aliaj montras, ke ili ofte uzatas kvazaŭ-sinonime: -ant-/ul- (vidu supre), -ist-/ul- (sciencisto – scienculo), -an-/ul- (ĉielano – ĉielulo k.s.).

“-In-” kaj “-ul-” uzatas ankaŭ *memstare*: “ino” estas senpara (ne havas masklan paron) tiel semantike ĝi estas proksima al amazono, madono ktp. “-Ulo” – “ulino” aperas pare:

ULO $\frac{\text{homo}}{\text{masklo} + \text{senkarakteraj trajtoj}}$

VIRINO – femala paro de VIRO.

Por klare vidi la diferencon inter tiuj vortoj ni tabeligu iliajn semantikajn trajtojn (● jes, ⊕ kaj, ○ ne):

	Femalo	Homo	Markita	Para
INO	●	⊕	○	○
ULINO	●	●	○	●
VIRINO	●	●	●	●

El la tabelo evidentiĝas ke, kvankam ili estas sufiĉe proksimaj, tamen ne tute egalaj, eĉ se ilia diferenco estas ofte nur nuanca aŭ stila. Ni, konsente kun Maitzen, ne rimarkas iun “malŝatan nuancon” ĉe “ino” aŭ “ulino”. Almenaŭ ili ne estas dedukteblaj el la semantika elemento de la morfemoj. Kiel tre ofte (sed ne saĝe) denove temas pri etna-lingva influo, konkrete: pri la tradukoj en nacilingvaj vortaroj. Ekz. en la Esperanto-Hungara vortaro “ino” estas tradukata kiel *nőstény*. Sed *nőstény* povas esti nur bestino (kaj neniam virino!). En la Rusa vortaro de Bokarjov “ino” estas tradukita kiel: 1. estaĵo in-seksa; 2. virino; 3. bestino. Sed en la inversa vortaro la vorton *samka* (signifanta “inbesto”) oni tradukas nur per “ino” kaj ĝian paron *samec* per la ĝusta vorto:

“vir-besto”.

Cetere tiu ĉi malŝata nuanco ne evidentiĝas el la ekzemplo-frazoj de PIV: “La partecipa sufikso, laŭ sia senco mem esprimas ulon.” (Ne preciza frazo: ne la sufikso, sed la sufikso + o. La sufikso en si mem tion ne esprimas, se al ĝi algluiĝas la finaĵo -a aŭ -e. El la frazo do sekvas, ke: -anto = -ulo).

Alia frazo: “Se mi estus jam maljuna ulo...” = Se mi estus jam maljunulo = Se mi estus jam maljuna... Ni daŭrigu kaj finu: ...*eble mi ne okupiĝus pri inaj problemoj*.

Internacia Printempa Semajno 79.

Frédéric Le Magadure

Organizite de la Esperantista Kulturdomo kaj de la Franca sekcio de ILEI, jam de la jaro 1975, la Internacia Printempa Semajno bone meritis sian nomon ĉijare, ĉar partoprenis pluraj grupoj kun sia gvidanto. Venis 4 geknaboj el Hvidovre (Danujo) kun Lis Thune, 8 knabinoj el Wormer (Nederlando) kun Pim van Tol, 3 gelernantoj el Le Mans kun J. Bénistant, 17 gelernantoj el Hennebont kun Frédéric Le Magadure. Aldoniĝis germana knabo kun kelkaj aliaj junaj Francoj akompanataj de siaj gepatroj. Entute ariĝis 40 infanoj kaj gejunuloj.

Matene, ĉiu laŭ sia nivelo sekvis unu el la tri kursoj gvidataj de Lis Thune, Pim van Tol kaj Frédéric Le Magadure. Ankaŭ plenkreskuloj partoprenis ilin.

Posttagmeze, la vasta parko de Grésillon ebligas multajn ludojn kaj promenadojn, kolektadon de primoloj kaj aliaj floroj por ornamo la tablojn de la manĝoĉambroj aŭ la dormoĉambrojn. Unu posttagmezo estis dediĉita al la vizito de la urbo Tours, riĉa je vidindaĵoj: la katedralo, la rivero Loire, la malnovaj kvartaloj bele renovigitaj, la muzeo de la metifrateco... Ĉio okazis sub la lerta gvidado de Tours-ano, Paul Poisson. Ankaŭ la veturado estis tre agrabla kaj gaja, ĉar la infanoj sin sekvis ĉe la mikrofono por kanti en Esperanto aŭ en sia nacia lingvo. Inter la promenadoj, ni menciis ankaŭ la viziton al la dolmeno kaj tiun al la bestofoiro en Baugé.

Dum la vesperkunvenoj ĉiuj plezure kantis. La ĉeestantoj konatiĝis kun la loĝlokoj de la grupoj, dank’ al la lumbildoj komentitaj de la koncerna gvid-

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

anto. La programo de la lasta "ĝenerala" vesperkunveno (antaŭ la foriro de la Danoj) estis riĉa kaj diversa: sin sekvis kantoj, skeĉoj, lumbildoj desegnitaj kaj komentitaj de la infanoj mem. Dum la preparado de tiu lasta serio, la eksterlandaj instruistoj lernis la tehnikon pri lumbilddesegnado. Multe plaĉis la prezentado de diapozitivaj nigrablankaj, kiuj revivigis bonegajn epizodojn de la ĵus pasintaj tagoj. Ni ŝuldas tion al la staĝfotistoj, Henriko kaj Yannick, kiuj unuafoje provis tiun rimedon, unuafoje kaj sukcese. Aliaj staĝanoj helpis ilin en la rivelado kaj tondado de la bildoj.

La infanoj sin okupis ankaŭ en la multobligado de tekstoj kaj desegnoj por la staĝjurnalo, donacita al ĉiu partoprenanto en la lasta vespero, kaj en la farado de krokodiloj aŭ kolieroj el perloj...

La etoso dum tiu restado havis familian karakteron, ĉio glate disvolviĝis dank' al la bonaj rilatoj inter ĉiuj. Konklude, la Internacia Printempa Semajno tre bone sukcesis kaj ni diras nur "ĝis revido!"

La plenkreskaj partoprenantoj de la Paska Periodo havis unikan okazon pristudi la pedagogion de la lingvoinstruado al infanoj laŭ jena skemo: ĉiu-matene, ili vizitis laŭvice unu el la kursoj. Posttagmeze, ili kunvenis por prezenti siajn rimarkojn pri la instrumaniero de la respektiva gvidanto. Sekvis debato sub gvidado de s-ino Vincent. Fine de la restado, la seminarianoj klopodis eltiri kelkajn konkludojn kaj gvidprincipojn por Esperanto-instruado al infanoj:

- plene uzi la aktivemon de la infanoj, invitante ilin desegni, kanti, gesti, mimiki, iri al la tabulo (ili aparte ŝatas tion);
- uzi ankaŭ ilian kreivemon per manlaboraĵoj, ĉiuj aktivaĵoj celante al akiro de sufiĉa vort- kaj fraz-provizo por kiel eble plej kompleta esprimkapablo.

Facile konkludiĝas, ke oni instruu laŭ rekta metodo, ĉefe kiam la infanaro estas diversnacia, kiel ĝuste okazis en Gréssillon.

Aŭstralujo	Jean Lehane, 2A Harms st., Toowomba, Queensland 4350
Aŭstrujo	Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno
Belgujo	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal
Brazilo	Elvira Fontes, C. P. 5888 São Paulo
Britujo	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH
Bulgarujo	Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danujo	Lis Thune, Bremsbävänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnujo	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Franclujo	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
F R Germanujo	Hermann Behrmann, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn
Grekujo	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506)
Hispanujo	Francisko Zaragoza Ruíz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo	Zsuzsa Barcsay, Bem Kp. 25/b, H-1011 Budapeŝto
Islando	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Israelo	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv
Italujo	Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pĉk. 22-2883
Japanujo	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343
Jugoslavujo	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2:IV-32, YU-11000 Beograd
Luksemburgo	Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette
Kolombujo	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
Koreujo	---
Malagasujo	Eugene Raveloson, B P 127, Antananarivo
Nederlando	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl
Nordameriko	John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266
Norvegujo	M. Landmark, Univ. i Oslo, Psykologisk Inst., PB 1094, Blindern, Oslo 3
Nov-Zelando	Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt
Polujo	Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa
Rumanujo	---
Sanmarino	Marina Michelotti, via 25 marzo 73, I-43031 Repubblica di San Marino
Sovetujo	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV
	Nikolaj Starodubĉev, Poštrestante, SU-340047 Doneck
Sud-Afriko	Adèle Fouché, 6 Astoria Court, Summerstrand, Port Elisabeth 6001
Svedujo	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund
Svisujo	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz
Venezuelo	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

IZOLITAJ MEMBROJ

Ĉeĥoslovakujo	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Příbram
Ĉinujo	Lu Chien-bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan
Germana D R	Till Dahlenburg, str. d. DSF 13, DDR-2722 Brüel
Irano	M. Saghafian, Širas ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19
Jemena PDR	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh Hospital, Khormaksar, Aden
Kubo	Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
Singapuro	Hongí Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14
Zairujo	Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu

ESTRARO DE ILEI

prezidanto	rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F. R. Germanujo
vicprezidanto	direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, Hungarujo
sekretario	d-ro prof. Mario Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, Italujo
vicsekretario	prof. Francisko Zaragoza Ruíz, Colegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo
kasisto	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

KUNLABORANTAJ ORGANIZOJ

FIMEM	Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
UEA	Universala Esperanto-Asocio
Unesko	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

aperas trifoje jare

redaktas – Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, FRG

poŝtĝirkonto – Stockholm 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono – 20 svedaj kronoj

la abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita poŝtĝirkonto